

Kajeroj el la Sudo


ISSN 1886-1997

La 37an jaro

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k132/k132.html>

Ne estas objektivaj argumentoj: nur tiuj, kiujn vi ŝatas, kaj tiuj, kiuj ne plaĉas al vi



Ĉu Pretervivo estas?

Je la intereso de vero

Unuiganta popolo neniam estos vendata

N^o 132^a

Julion de 2024^a

Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia
Hispanio

Enhavo

Redaktore: Pluvivo.....	3
Pensigoj:	
Unuiĝanta popolo.....	5
Je intereso de vero.....	8
Finaskitoj.....	11
La kroŭmbuk'.....	13
Trafiko.....	14
Ĉu Pretervivo ekzistas?.....	18
Perversiguloj de lingvo.....	23
Vivo kaj verkaro.....	27
Defendo de Hispanismo:	
Kapacito de konvertiĝo.....	28

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

**Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Nesubskribitajn artikolojn
verkis la redaktoro.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni
trovos interesa .**

Kovrilo: Saachen Plumeto protestas nome de Marlon Brando je la 45^a disdonado de premio Oskar' en Holivudo. Digneco estas premio per si mem.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

**Se vi deziras kontibui per aliĝo,
kontaktu la redaktoron:
kajeroj@gmail.com**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondicè,
ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
Scribus, Bluefish, LibreOffice, Gimp, kaj Yafc.

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.



Redaktore

Pluvivo

Hodiaŭ funebras mi: antaŭ kelkaj tagoj (la 11^{an} de marto) mortis amiko, kiu redaktis la ĵurnalon, kie mi publikigis artikolojn, **VegaMediaPress**, de Mursjo. Fakte, ofte mi publikigis tie hispanajn versiojn de artikoloj, kiujn mi jam publikigis en ĉi tiu magazino.

Sed tio jam estas historio! Li subite mortis je la aĝo 61jara, kaj pro stulta falo surstrata. Jes, homo estas plej alta besto sur la mondo, kaj tamen tre fragila: sufiĉas unu bato por rompi nin ĝismorte. Li estis unu el tiuj homoj, kiuj devas fari ĉion, kaj sekve li ne komisiis parton de la publikigado de la ĵurnalo al iu ajn, tiel ke, se li ne povis fari ĝustatempe la tagan eldonon, ĝi aperis poste; kaj tamen pli ol 60 000 homoj legis la ĵurnalon ĉiun tagon. Kaj kio okazas nun, post lia morto? Nu, la ĵurnalo mortis ankaŭ, ĉar ne estas homo, kiu sukcesos eldoni la komunikilon, ĉar mankas paŝvorto kaj atingo al informadikaj rimedoj, per kiuj li eldonis sian publikaĵon.

Eble leganto demandos sin pri tio, kial mi parolas pri tio. Sed la kazo de mia kara amiko — nomita Jesuo, koincide—, estas simila al tiu de *Kajeroj el la Sudo*:

Kiel niaj legantoj scias, Antonio Marco Botella redaktis la unuajn 29 numerojn de nia magazino. Kiam li sentis sin senforta por



daŭrigi la aferon, li petis de ni, siaj legantoj, ke iu okupiĝu pri la perioda publikigado de sia kara revuo. Post kelkaj hezitoj, mi mem volontulis, inter la miloj da legantoj de la magazino. De tiam mi jam redaktis kaj publikigis la sekvintajn 103 numerojn. Mi sentas min forta, almenaŭ por redakti multajn numerojn ankoraŭ..., sed mi estas nur unu homo, kiu povas morti subite — same kiel mia samnomulo, la redaktoro de **VegaMediaPress**—, kaj tiukaze, laŭ la nunaj kondiĉoj, tio signifus la morto de nia kara magazino, ankaŭ. Se oni serĉas la retejon <http://www.vegamediapress.com>, oni vidos, ke oni jam deaktivis ĝin, kaj sekve la tuta laboro de mia amiko jam perdiĝis, de la jaro 2012^a ĝis lasta februaro 2024^a.

Ĉu estas solvo por tiu problemo? De kiam mi ekredaktis ĉi tiun magazinon, mi komprenis, ke tio ne estas mia afero, sed la afero de

ĉiuj legantoj kaj amikoj de Esperanto kaj Hispanio. Do, estus domaĝe, ke nia magazino mortu kun mi, same kiel *VegaMediaPress* mortis kune kun ties redaktoro. *Kajerojn el la Sudo* legas multaj homoj dise tra la mondo, ne nur en Hispanio, do mi petas, ke oni pretu daŭrigi ilin iam en la estonto. Sed tion oni ne povos fari subite el nulo. Mi ofertas lernigi kaj helpi redakton-tojn, kvankam mi ne antaŭvidas ĉesi la redaktadon en la ĵusan estonton. Mi jam aĝas 73jare, kaj se ĉio iras normale, mi ankoraŭ povos redakti ĝin dum dek, eble kelke pli da jaroj, sed se estos vic-redaktoro(j), kiu(j) povos elpreni la taskon en la estonto, mi kredas, ke esperantistoj dankos pri ties sinsekva agado.

Eble, oni demandos sin pri tio, kio estas *Kajeroj el la Sudo*, kia ĝi estas, kaj kial utilas, ke ĝi daŭrigos sian aperadon post kiam mi jam malaperis. Nu, ĉi tiu magazino aperis je la jaro 1988^a, kaj de kiam mi ekokupiĝis pri ĝi, je 1996^a, geesperantistoj dise tra la tuta mondo povas legi ĝin tute senpage. Niaj paĝoj neniam estis makulataj de politika aŭ religia eldonaj sintenoj, ĉar ĉiuj, kiu tion deziris, povis publikigi tion, kion ili deziris, ene de kelkaj kondiĉoj pri ĝentileco kaj neinsulto, sed tute libere. Pro tio, ke neniun artikolon oni rifuzis, kelkaj samideanoj ĉesis sian abonon al la magazino, kvankam ili daŭre legas ĝin. Mi eĉ estis forigita de SAT ĉar ili trovis, ke mi ne estis *sufiĉe progresema*, sed ŝajne tiu progreso, pri kiu ili fieras, estas certe dogmeco kaj netolereemo al alies opinioj. Do, fakte, min forpelis de la asocio pro tio,

ke mi postulis, ke oni honoru la Statuton de SAT mem, kiu atentigas kaj malpermesas tiun dogmecon kaj netolereemon! Jes, la homoj, kiuj formis tiaman Plenumkomitaton, kiu forpelis min ne plu oficas, sed la asocio mem neniam sendis al mi senkulpiĝon kaj inviton reveni en la asocion. Fakte, mi ne kredas, ke mi realiĝos, sed tio pruvus, ke SAT ne plu estas sekteca kaj netolereema, ĉesante ties demagogion. Tio ne utilis al mi, sed al SAT.

Sed mi ne plendu denove pri la aferon, ĉar ĝi ne vere gravas. Justa homo ne havas lokon inter maljustuloj. Tio, kio gravas, estas la pluvivo de *Kajeroj el la Sudo* en la estonto.

Sekve, vi, leganto, ĉu vi pretus helpi la pluvivon de nia magazino? Se jes, kion vi bezonos fari decidon? Verki ne estas tiom malfacila, kiel oni povus pensi. Kaj mi helpos vin. Oni ne necesas esti en la sama urbo, kie mi estas. Fakte, oni povus loĝi ĉe la alia angulo el la mondo, kaj tamen, ni kune povus redakti la magazinon, ĝis kiam nova redaktoro povos fari per si mem kaj mi ne plu povos. Tiumomente la nova redaktoro devus trovi kunredakton, kiu anstataŭos lin aŭ ŝin por ke la tasko daŭrigu.

Ĉu oni respondos al tiu mia invito? Se jes, retumu min al kajeroj@gmail.com, mi petas.

Unuiĝanta popolo neniam estos vendata


Estas sufiĉe gravaj aferoj en Enuna Hispanio, kiuj povas redifini la ŝtaton, la nacion kaj la graveco de nia lando ene de la mondo.

Estas, vere, kiel la reĝo de Hispanio diris iam, ke la historion de la mondo oni ne komprenas sen la agado de Hispanio tra la jarcentoj. Sed ĝenerale tiujn vortojn hodiaŭ oni ne komprenas kaj eĉ neas danke al la enfiksiĝo de la **Nigra Legendo**, kies mensogoj multe da nia kuncivitanoj kredas kiel verojn, ĉar —laŭ tio, kion diris la iama Prezidento de Hispanio, Felipe González Márquez— *vero estas tio, kion plej multo da homoj diras ke estas vero!* Mi kredas, ke li diris tion ironie, tio estas, signifante la malon de tio, kion li fakte diris. Bedaŭrinde multe da hispanoj ne bone komprenas ironion, kaj kredas, ke tio ja veras.

Fakte, necesas tre granda kvanto da ignoranteco kaj sekteco defendi la atakojn al nia bonfarto kaj leĝaro kredi tion, kion politikistoj diras, nur pro tio, ke la koncerna politikisto estas **tiu nia**. Simple dirite, la mensogojn de la registaroj oni akceptas, ĉar ni estas sektaj partianoj de la partio en povo, aŭ tute male, oni rifuzas ilin, ĉar

oni estas sektecaj partianoj de alia partio politika. Kaj tio ne estas rezonebla.

Prudenta homo devas kompreni tion, kio okazas, kaj juĝi inteligente, laŭ leĝo kaj logiko. Jes, veras, ke oni povas ŝanĝi



leĝon per nova, nelogika kaj stulta leĝo. Pro tio mi diris ankaŭ *logike*. Nelogikaj leĝoj venas kiam registaro kaj leĝofarantoj ne reprezentas la popolon, kaj sekve ili ne zorgas pri la popolo, kiu pagas ties salajrojn. Kiam politikistoj reprezentas nur sian ideologion aŭ sin mem, tiuj problemoj aperas. Pro tio ni havas tiom balasto en nia leĝaro, kiu ne oportunas al la bonfarto de la popolo, sed al ideologio kaj personaj intereso de politikistaro.

Ĵuspasintece, la lastan 23^{an} de julio, okazis ĝenerala voĉdono en Hispanio, tio estas, oni voĉdonis deputitojn por la hispana Parlamento, kiu siavice elektis la Prezidanton de la Registaro. Venkis la balotadon, laŭ la plejmulto da voĉdonoj, Sinjoo Alberto Núñez Feijoo, gvidanto supera de Partio Popola. Sed li ne havis pli da voĉdonoj en la parlamento el alipartianoj kune. Sekve la Reĝo petis de li prezenti al la parlamento sian programon, por ke oni voĉdonu ĉu li estos la nova prezidanto de la registaro, ĉu ne. Kaj plimulto el parlamento voĉdonis nee. Sekve, la Reĝo petis same de la gvidanto de la sekvanta plej voĉdonita partio, PSOE, S-ro Petro Sánchez Pérez-Castejón. Sed ĉi-foje ĉiuj aliaj partioj krom PP kaj VOX voĉdonis al li, tiel ke li povis sukcese iĝi Prezidanto de la Registaro kaj nomumi siajn 20 ministrojn.

Bedaŭrinde kolekti plejmulton da voĉdonoj postulis, ke li promesis aferojn ekster- kaj kontraŭleĝaj, kiel pardono amasa kaj amnestio al tiuj, kiuj je 2018^a provis rompi la unuecon de la Ŝtato Hispana. Mi diras ekster kaj kontraŭleĝaj, ĉar ili estas malpermesitaj de la Hispana Konstitucio per 7^a punkto de artikolo 62^a indikas, ke la reĝo povas: *Ekzerci la rajton de pardono*

laŭ la leĝo, kiu ne povos permesi ĝeneralajn pardonojn.

Tamen, la reĝo de Hispanio subskribis dokumentojn por pardono ĝenerala al naciistoj, kiuj puĉis je 2017^a kaj poste estis kondamnitaj pro tio; kaj ankaŭ amnestio al aliaj, kiuj ankoraŭ ne estis juĝataj pro tiu sama kazo, kiel ekzemple Marta Rovira kaj Karlo Puĝdemont'.

Sed se la leĝo ne ebligas al la reĝo fari tion, kial li tamen faris tion? Bedaŭrinde mi ne konas la kialon, kaj eble oni ĝin ne konos dum kelkaj jaroj. Puĉistoj kaj naciistoj ŝajnas postuli de la registaro multe da favoroj, ŝanĝe al sia apogo al kandidato, nuna Prezidento Petro Sánchez. Sed aĉeto de favoroj estas krimo, kaj ŝajnas al mi nekredebla, ke juĝistoj ne haltigis tion de kelkaj jaroj.

Generalo Franko puĉis per milito. Nunaj politikistoj puĉas pere de mensogo. Ne mankas tiuj homoj, kiuj pruvas, ke tiu ĉi reĝimo estas sinsekvo de la reĝimo de Generalo Franko. Tiam la popolo havis nenion diri. Nun la popolo havas nenion diri, laŭŝajne. Diferenco estas, ke tiam oni ne havis **individuan** liberecon, kaj nun ni ja havas tion, eĉ se limigite. Sed tiam kaj nun **ne ekzistas kolektiva** libereco: oni ne povas eksoficigi tuje politikistojn, kiuj krimiĝas aŭ simple ne plenumas la oficojn, por kiuj ili

estis voĉdonitaj. Sekve, ne ekzistas demokratio en Hispanio; kaj la afero, ke ankaŭ ne ekzistas en la cetero de Eŭropo —kun la ebla escepto de Francio—estas nek justigo nek klarigo. Ni ne estas erŭopanoj, ni estas hispanoj. Kaj ni devas labori ĉiutage por ke tio ne ĉesos esti.

Ĉar unuiĝanta popolo neniam estos vendata.

Sed ŝajnas, ke registaroj laŭ la tuta Eŭropo —ne nur tiu nia—intencas vendi nin al turpa ideologio verdeska, kiu asertas, ke la planedon Teron ni mortigas. Tio ja estas falsa aserto, kiel komprenas ĉiuj, kiuj iam studos ion pri Geologio: la planedo jam konis pli durajn momentojn, kiam homaron tute ne ekzistis, kiam vulkanoj superabundis sur la tuta surfaco, kiam la atmosfero estis plena da acido sulfura. Eble oni kredas, ke homo estas tiom grava, ke ties agoj influas la bonfarcon de la planedo. Mi kredas, ke ni estas rilate al ĝi same kiel mikroboj al ni: eĉ se ni povus kaŭzi provizoran ĝenon, sufiĉus ke la planedo movus sian ŝultrojn pere de tertremo por ke nia tuta agado nuligus. Kaj se jes, se homaro sukcesas poluri la atmosferon tiel ke la homa vivo ne plu eblso, la planedo daŭrigos sian evoluon ĉirkaŭ sia stelo dum almenaŭ aliaj 4 700 milionoj da jaroj. Kun aŭ sen ni. Do, la aserto generanta tiun sensencan ideologion verdeskan estas falsa denaske: la planedo antaŭvivis

nin, kaj certe postvivos nin, senrigarde al tio, kion ni faros.

Sed tio, kio povos ne supervivi estas homaro mem al agoj de homaraj regantoj. Ne estas solvo plenigi Eŭropon per afrikanoj, ĉar ili venas el kulturoj malavangardaj, kie virinoj estas malrespektataj kaj mistraktataj kaj kulturo kaj alfabetigo ne estas altaj aŭ ĝeneraligitaj inter ili. Tio rezultos en perdo de niaj valoroj kaj atingoj, ĉar demokratio falos kiam ĉiuj tiuj homoj povos voĉdoni, same kiel en Irano kaj aliaj landoj oni voĉdonis por regresivaj registaroj, kiuj nun persekutas tion, kio iam estis denaskaj rajtoj de ĉiuj civitanoj. La turpaj registaroj de Eŭropo kredas, ke per tiu amaso da homoj ili atingos eternan venkon en balotado, sed la alvenintoj havas diversajn kulturon kaj valorojn kaj enoficigos regresivajn registarojn, kiuj malebligos pacon inter nacioj. La batalo de kulturoj ne havos feliĉan finon, mi timas.

Eble tiam la popolo rekonfigurata amos siajn registarojn kaj fieros morti por ili, sed nun ni havas registarojn, kiuj malamas siajn popolojn, ni. Pro tio urĝas, ke ni unuiĝu kaj forprenu de siaj postenoj registarojn, kiuj obeas ideologiojn kontraŭpopolajn. Tiam la Prezidento kaj la Reĝo ne plu bezonos kaŝi sin malantŭ policanoj por ke la popolo ne plu insultos ilin pro malamo. Kaj —plej grave—, tiel **la popolo ne estos vendata.**

Je la intereso de vero


Je 1973 oni premiis aktoron Marlon Brandon per Oskaro al plej bona ĉefrolulo por sia laboro en la filmo *La baptopatro*, direktita de fama Francis Ford Coppola laŭ samtitolita romano de Mario Puzo, je la antaŭa jaro.

Tamen, ne li iris ricevi la premion, sed indianinon li sendis lianome **rifuzi** la premion pro la mistrakto kaj mensogado de hollywoodaj filmoj de la komenco de kinaro pri la rolo de la unuaj enloĝantoj de Usono, genocidataj de angloj kaj usonanoj laŭ la tuta historio de tiu lando.

Tiu indianino estis apaĉa **Saachen Plumeto** (Littlefeather), kiu la 27^{an} de marto de 1973 provis legi kvarpaĝan deklaron de Marlon Brando, sed oni ne permesis tion ekskuzante de manko da tempo, kiun oni ne postulis al aliaj gajnintoj.

La sekvintan 30an de marto, tamen, gravaj ĵurnaloj de Usono publikigis la tutan tekston. Ni publikigas ĝin ĉi tie por ĝenerala scio de tiu historia evento:

Dum 200 jaroj ni diris al la india popolo, kiu batalas por sia



tero, sia vivo, siaj familioj kaj sia rajto esti libera: Demetu viajn armilojn, miaj amikoj, kaj tiam ni restos kune. Nur se vi demetos viajn armilojn, miaj amikoj, ni tiam povos paroli pri paco kaj veni al interkonsento, kiu estos bona por vi.

Kiam ili demetis la armilojn, ni murdis ilin. Ni mensogis al ili. Ni trompe forpuŝis ilin el siaj landoj. Ni malsatigis ilin por ke ili subskribu fraŭdajn interkonsentojn, kiujn ni nomis traktatoj, kiujn ni neniam plenumis. Ni igis ilin almozuloj sur kontinento, kiu donis vi-

von tiel longe kiel la vivo povas memori. Kaj per iu ajn interpreto de la historio, kiel ajn tordita, ni ne faris ĝuste. Ni nek estis laŭleĝaj nek justaj en tio, kion ni faris. Por ili, ni ne devas restarigi ĉi tiujn homojn, ni ne devas plenumi iujn interkonsentojn, ĉar ĝi estas donita al ni pro nia povo ataki la rajtojn de aliaj, preni ilian posedaĵon, preni iliajn vivojn kiam ili klopodas defendi siajn landon kaj liberecon, kaj fari iliajn virtojn krimo kaj niajn proprajn malvirtojn virtoj.

Sed estas unu afero, kiu estas preter la atingo de ĉi tiu perverseco kaj tio estas la terura verdikto de la historio. Kaj la historio certe juĝos nin. Sed ĉu ni zorgas? Kia morala skizofrenio nia permesas al ni krei ĉe la supro de nia nacia voĉo por ke la tuta mondo aŭdu, ke ni plenumas nian sindevontigon kiam ĉiu paĝo de historio kaj kiam ĉiuj soifaj, malsatantaj, humiligaj tagoj kaj noktoj de la lastaj 100 jaroj en la vivo de la indiano kontraŭdiras tiun voĉon?

Ŝajnus, ke la respekto al principo de amo al la proksimulo iĝis malfunkcianta en ĉi tiu nia lando, kaj ke ĉio, kion ni faris, ĉio, kion ni sukcesis plenumi per nia potenco, estas simple neniigi la esperojn de la novnaskitaj landoj en ĉi tiu mondo, same kiel amikoj kaj malamikoj, ke ni ne estas homaj, ĉar ni ne vivas laŭ niaj interkonsentoj.

Eble en ĉi tiu momento vi diras al vi, kiel diable rilatas ĉio ĉi kun la Akademiaj Premioj? Kial ĉi tiu virino staras ĉi tie, ruinigante ni-

**Saachen
Plumeto Kaj
Marlon Brando
ĉefrolis la
lastan venkon
de indianoj sur
palvizaĝuloj**



an vesperon, invadante nian vivon per aferoj, kiuj ne koncernas nin, kaj pri kiuj ni ne zorgas? Malŝparante nian tempon kaj monon kaj entrudiĝante en niajn hejmojn.

Mi opinias, ke la respondo al tiuj neeldiritaj demandoj estas, ke la filmkomunumo estis same respondeca kiel iu ajn pro degradado de la indiano kaj primokado de lia karaktero, priskribante lian kiel sovaĝan, malamikan kaj malbonan. Estas sufiĉe malfacile por infanoj kreski en ĉi tiu mondo. Kiam indiaj infanoj spektas televidon, kaj ili spektas filmojn, kaj kiam ili vidas sian rason prezentita, kia ĝi estas en filmoj, iliaj mensoj vundiĝas laŭ manieroj ki-

ajn ni neniam povas scii.

Lastatempe okazis kelkaj ŝanceliĝantaj paŝoj por korekti ĉi tiun situacion, sed tro ŝanceliĝantaj kaj tro malmultaj, do mi, kiel membro de ĉi tiu profesio, ne sentas, ke mi povas kiel civitano de Usono akcepti ĉi-nokte premion. Mi kredas, ke premioj en ĉi tiu lando nuntempe estas netaŭgaj ricevi aŭ doni ĝis la kondiĉo de la indiano estos draste ŝanĝata. Se ni ne estas gvardisto de nia frato, ni almenaŭ ne estu lia ekzekutisto.

Mi estus tie ĉi-nokte por paroli rekte kun vi, sed mi sentis, ke eble mi povus pli bone utili, se mi irus al Vundita Genuo (Wounded Knee) por helpi malhelpi laŭ mia maniero la starigon de paco, kiu estus malhonora tiel longe kiel la riveroj fluos kaj kreskos herbo.


Mi esperas, ke tiuj, kiuj aŭskultas, ne rigardos ĉi tion kiel malĝentilan entrudiĝon, sed kiel fervoran klopodon koncentri atenton pri afero, kiu tre bone povos determini ĉu aŭ ĉi tiu lando havas la rajton diri de ĉi

tiu punkto antaŭen, ke ni kredas je la neforigeblaj rajtoj de ĉiuj homoj resti liberaj kaj sendependaj sur teroj kiuj subtenis sian vivon preter vivanta memoro.

Dankon pro via afableco kaj via ĝentileco al Fraŭlino Plumeto. Dankon kaj bonan nokton.

Mi memoras, ke tiu afero estis en ĵurnaloj laŭ la tuta mondo. Ankaŭ mi memoras, ke oni publikigis ĝin malestime, kaj oni diris, ke tiu aktoro, Brando, estas snobulo, kiu deziras nur fari senpagan averton por li mem. Sed ĝis nun mi ne legis la tutan deklaron, sendemagoga tordo. Kaj mi opinias, ke Marlon Brando kaj Saacheen Plumeto estis kuraĝaj kaj respektindaj tiun tagon. Pro tio indas, ke eĉ 51 jarojn poste oni agnosku veron pri tio.

Tio, kaj la afero, ke John Wayne volis bati la indianinon, decidigis min ne plu spekti vakerfilmojn. Ne indas vidi mensogojn kaj tordadon de historio.



Ŝajnas strange, ke rolulo de krimulego ne voias premion iusence makulitan per sango.

Finaskitoj

Oni komprenu kiel finaskitoj tiaj homoj, kiaj neniam devus esti naskitaj.

Eblas. le kelkaj konsideras, ke kiam oni aliĝas al polico, oni devas antaŭvidi tion, ke morto povas veni dumserve, kaj onidire, tio estas honoro por policano, morti en siaj botoj, anstataŭ en malsanulejo post longa malsano. Sed la murdinto de policisto mortigas ne nur lin, sed ankaŭ ĉiujn tiujn, kiujn li reprezentas, tio estas, nin ĉiujn, kiuj pagas ties salajron por protekti nin.

Antaŭ kelkaj monatoj mortis du civilaj gvardistoj pro fiago de du bastardoj, kiuj gajnas multe da mono koste de la malfeliĉo de aliaj, alportante aŭ vendante drogojn el Maroko. Mi ne komprenas, kiel la Reĝo de tiu lando, kun tia absoluta povo, kiun li havas, ne ĉesigas ĉi tiun plagon, nek mi komprenas, kiel la Eŭropa Komunumo donas al li tiom da avantaĝoj sen postuli, ke, kontraŭe, li metu finon al la kultivado kaj distribuado de drogoj per kiuj tiom da finaskitoj riĉiĝas en la suda parto de Hispanio. Aliloke ili kaptas la monon kaj posedaĵojn de tiuj, kiuj ne povas pravigi, kiel ili akiris la havaĵojn, kiujn ili ĝuas, sed aliflanke ĉi tie tre blinda okulo estas turnita al tiuj, kiuj

havas tiujn domegojn en Barbate kaj aliaj lokoj en Cádiz, dum aliaj el ni devas pasigi jardekojn por pagi hipotekon por modesta loĝejo en pli diskretaj partoj de la hispana tereno. Estas maljuste, ĉu ne? Sed maldekstro, tiom egaleca kaj egaliga, restas silenta antaŭ tia malekvilibro en la pesilo de justeco...

Ĉar drogoj mortigas. Ĝi riĉiĝas la senkorulojn, kaj mortigas la neprudentajn kaj malsaĝulojn, kiuj kredas, ke ili trovos sin en alia dimensio, kiun ili povos atingi kun multe pli da laboro kaj koncentriĝo, sen la helpo de narkotaĵoj kiuj subfosas ilian santon ĝis morto. Ĝi estas alia filozofio, kompreneble. Tiu de neniu penado, tio estas, pura maldiligento, kaj tiu de ĉiutaga penado, la raciigo, kiu kondukas al transcendo de la menso mem kaj atingi alian dimension en kiu novaj sentoj estos spertaj sen puni ĉi tiun veturilon, kiu akompanis nin dum nia tuta vivo, nia korpo. Sed ĉiuj sensciaj homoj opinias, ke ili estas pli inteligentaj ol ĉiuj aliaj. La malbonnaskitoj kaj la neprudentuloj.

Fine, ili loĝas en sancentron aŭ intensfleĝejon, se ili bonŝansas, kun dolormildiga prizorgado, dum tiuj, kiuj multe laboris, eble finos alportante al ili nemeritajn florojn, ĉar temas pri gefratoj, gepatroj aŭ idoj de tiuj,

kiuj priploras ilin.

Drogoj movas milionojn, jes, estas vero. Sed ĉu ĝi indas? Kial vi volas tiom da mono, se vi estas idioto, kiu ne scias, kion vi faros per ĝi? Jes, vi povas aĉeti jaĥton, kiun vi ne povos veturi sen la titolo, kiun vi ne povos akiri, ĉar vi estas tre stulta kaj vi devos pagi iun por navigi ĝin por vi, aŭ aĉeti superaŭto, kiun vi ne povos uzi pli rapide ol modestan veturilon sen esti metita en malliberejon, aŭ loĝi en domo, kiun vi devos ekipi per fotiloj kaj sekureca sistemo ĉar okupantoj aŭ krimuloj de alia tipo malsama ol via povas eniri kaj fari vian vivon mizera. Kaj, kompreneble, se tio okazus al vi, devus voki vi tiam viajn malamatajn civilajn gvardistojn por protekti la posedaĵon, kiun vi akiris per sangomono kaj doloro de drogviktimoj. Ĉu tio hontigas vin? Nu, mi supozas, ke ne. Se vi konus honton, vi laborus honeste.

La ĉefrolulo de *Breaking Bad* (*Rompigante malbonon*, fama serio televida pri drogfariŝto) havas sian tutan kontraŭleĝe gajnitan monon forprenita de la ŝtato. Tio ŝajnas ne okazi en Hispanio. Kial? Tie mi vidas kulpon en la registaro de Hispanio. Mi neniel havas manieron —kiel la ceteraj miaj samcivitanoj— res-

pondecigi la registaron de mia lando, sed mi povas publike denunci ĝin el ĉi tiuj paĝoj ĉar ĝi ne konformas al la kondiĉoj por kiuj ĝi estis dungita de la naivaj homoj, kiuj voĉdonis ilin. Sed mi montras al ili la fingron, kiel kulpa pro tio, ke ili ne postulas pruvon de kie ili akiris la monon por aĉeti tiujn grandajn domojn, rapidajn boatojn kaj superaŭtojn. Ne por tio oni dungis vin, sinjoro prezidanto de la Registaro. Havu la honton kaj dignon doni la taŭgajn ordonojn por ke tio estu esplorata, kaj se vi ne povas pro kia ajn kialo, havu la dignon demisii de via posteno, eĉ se vi devas iri loĝi en lokon kiu ne havas ekstradicion kun Hispanio, se tiel estas la afero... Kaj se ne, vi ankoraŭ ĝuos mian tutan respekton kaj tiun de la ceteraj bonaj hispanoj.

Dume, tiuj bastardoj, kiuj malnoble murdis tiujn du civilajn gvardistojn, havos tridek jarojn por bedaŭri la momenton de aroganteco kaj senkoreco, kiun ili havis, kiam temis pri murdo de iuj el ni aŭ de ni ĉiuj. Hodiaŭ mi ankaŭ estas civila gvardisto sur ridindige malgranda marveturilo ĉar la ministro Marlaska devis dediĉi la rimedojn, kiujn oni rifuzas al ili en la markolo por protekti la kinartan ceremonion Goya.

La krombuk' de mia patro

Se mia patro havintus *Chromebook*-on...

Liatempe li sukcesis ĝui *Spectrum*-on, komputilon kun 16k da memoro kiu devis esti aliĝinta al televidaparato por ke oni

povis vidi tion, kion ĝi faras, kaj al magneto-fono por stoki datumojn kaj programojn. Muziko restis ankaŭ sur sonbendoj kaj vinildiskoj, kaj kino havis nenion komunan kun tiu humila komputilo. Nun por malpli da mono ol tiu, kiu *Spectrum* valoris (€300 ekvivalentaj al 50.000 pesetoj, duono de bona salajro tiam), tio estas, por nur €200 (malpli ol dekono de nuna salajro de instruisto) mi aĉetis ĉi tiun *Chromebook*, per kiu mi skribas ĉi tion, kiu *apenaŭ* havas 32 gigabajtojn da stokado, tio estas 187 500 fojojn pli da memoro ol tiu respektinda *Spectrum*, kiu vekis tiom da esperoj en la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento.

Mi memoras, ho, jes, mi memoras, kiel li kantis al mi pri la virtoj de tia aparato, per kiu amiko jam verkis sian doktoran tezon, kvankam mi —kiu tute ne vidis ĝin klare— argumentis,

ke mi preferas kalkulilon, kaje-ron, libron kaj plumon, kaj eĉ murkalendaron por plenumi la funkciojn, kiujn tiu *supermoderna invento* antaŭvidigis. Kaj tamen nun mi estas tiu, kiu skribas kaj eldonas librojn kaj revuojn, kiujn oni vidas tra la tuta mondo



kaj ankaŭ mi spektas filmojn kaj pagas miajn fakturojn en eksterlandoj danke al ĉi tiu modesta *Chromebook*, giganto kompare kun la reĝo de komputiloj de la 80-aj jaroj, la unua el ili ĝis aperis tiuj, kiuj havis diskon anstataŭ bendo, kaj tial ĝia operaciumo estus nomita **DOS**, tio estas **Disk Operating System**, operaciumo kun disko.

Nu jes, se mia patro sciis, ke mi povus spekti televidon el iu ajn lando en la mondo per aparato, kiun mi portas en la poŝo, per kiu mi povas ankaŭ paroli kun iu ajn en la lando, kiun mi elektas, kaj ke miaj

financoj ankaŭ permesus tion al mi..., jes li estus tre feliĉa. Kaj en la ombro de ĉi tio mi demandas min, kion mia filo povos fari estonte, ke mi ankoraŭ ne povas? Kaj mia nepo?

Oni diras, ke teĥnologio estas multe antaŭ nia etiko, sed mi kredas ke ne: homo restas homo, kun pli da aparatoj aŭ malpli, kun pli da teĥnologio aŭ malpli.

Estis krimo mortigi iun per makzelo de azeno, kaj nun same krime estas fari tion per kalasnikov. Kio gravas ne estas la teĥnologio, sed la volo de la homo, kiu ĝin uzas. Sed per teĥnologio oni povas fari multon da bono.

Ni faru ĝin pli bone. Hodiaŭ eblas.

Trafiko

Ni pasigas nian vivon en la amaskomunikilaro kritikante la Nacian Registaron, la Regionan Registaron, kaj politikistojn de ĉiuj emoj, sed ni ne forgesu tion, kion ni havas plej proksime, kio plej influas nin, nian karan urbon de Murcio, kaj la aliajn urbojn en la regiono. Sed mi ne loĝas en Lorko de multaj jaroj, kaj mi konas Kartagenon kaj aliajn urbojn de nia komunumo nur vizitante, do ĉi-foje mi parolos pri la ĉefurbo de la provinco, kvankam mi supozas, ke la civitanaj problemoj estos similaj en aliaj lokoj en nia kara uniprovinca komunumo.

La unua afero, kiun mi denuncos, estas la altrudo de la biciklovojo. La popolo neniam petis ĝin, kaj ĝi obeas al la deziro de la politikistoj trudi al ni civitanoj ideon, kiu devenas de erara, mallerta kaj perforta ekologia ideologio. Kaj mi diros

al vi kial.

Murcio estas verŝajne —almenaŭ laŭ mia informo— la urbo en Hispanio, kie la plej multaj bicikloj estas ŝtelitaj. La urbestro, en laŭdinda iniciato, promociis la luadon de ĉi tiuj nemotorigitaj transportiloj, sed ne disponigis sufiĉajn rimedojn por malhelpi amasan ŝtelon. Mi konas neniun, kiu aĉetis ĝin kaj ne estis viktimo de bicikliŝtelo. Eĉ tiuj instalitaj de la urbodelegitaro, kaj nun la koncesiaj kompanioj, daŭre estas ŝtelitaj malgraŭ la ideo, kiu estis disvastigita tiutempe, ke ili havis kaŝitan blaton kiu identigus ilin. Do, se oni ne garantias, ke oni ne ŝtelos sian biciklon, kaj eĉ ne garantias, ke tiuj, kiujn la urbestro disponigas al ni, ne estos ŝtelitaj —eĉ se ili ne estas (kiel estus dezirinde) senpage —, kial difekti trafikon kun vojo por bicikloj, kiujn fakte uzas

motorveturiloj, la timitaj kaj danĝeraj skutiloj?

Ĉar skutiloj, kvankam ĝi povas ŝajni mensogo al kelkaj, estas duradaj motorveturiloj, kiel motorcikloj. La fakto, ke ilia motoro estas elektra, ne igas ilin malpli danĝeraj, sed —male— ĉar ili estas multe pli trankvilaj ol tiuj de motorcikloj, ili prezentas pli grandan riskon akcidenti. Mi ne konscias, ke okazis mortintoj en nia urbo pro tio, sed tio ne signifas, ke ne okazos estonte, nek ke ili ne estas danĝeraj. Tial ili ne rajtu veturi sur la trotuaro en neniu cirkonstanco, kaj se ili faras tion, la polico devus trudi la monpunojn preskribitajn de la Ŝosea Kodo.

Bicikloj, aliflanke, ne estas motorveturiloj, do oni povus fermi la okulojn al ili, ĉar la Ŝosea Kodo, laŭ mia scio, ne malpermesas al ili veturi sur la trotuaro, krom se ekzistas ia urba ordono, kiu; malpermesas ĝin. Mi ne estas devigata koni tiun ĉi ordonon, kompreneble, ĉar mi ne uzas biciklon en nia ĉefurbo. Aliflanke, estas freneze ne promeni ĉie en nia urbo, ĉar oni povas iri de rando al rando en malpli ol duonhoro, laŭ mia persona sperto.

Aliflanke ni havas belan tramon, kiu ni tute ne bezonis.

Jes, sinjoroj, la tramo ruinigas trafikon en Murcio. Metroo devus esti konstruita, kaj se ne estis mono aŭ deziro fari ĝin, oni devintus ne puni nin per tiu veturilo, kiu donas al ni pli da problemoj ol solvoj. La ideo mem estus bona, se estus plenumitaj du kondiĉoj, kiujn mi ne scias, ĉu ili estas planitaj en la estonteco, sed ke ni bezonus ekde la unua tago, ke tiu veturilo trafis la relojn: 1 ke ĝi kovru la tutan teritorion de la urbo, kaj 2 ke Ĝi estu tute senpaga por ĉiuj. Bedaŭrinde ĝi estas senpaga nur por emerituloj kiuj ricevas malpli ol €400 monate en pensio. Mi volas diri, por neniu, pri kiu mi scias. Denove ni estas kun la frustracio pri volo kaj ne povo. La tramo ne estas senpaga, ne, malgraŭ ke oni faris provojn tiusence, kiam la tramo estis inaŭgurita kun limigita vojo, kaj la pasintan Kristnaskon. Se estus linio kiu transirus la urbon kaj irus de Rondorejo Norda ĝis Rondirejo Sudo, kaj alia kiu ĉirkaŭirus la tutan urbon, kaj ĉiuj linioj estus senpagaj, multaj civitanoj lasus sian aŭton en sia garaĝo kaj uzus la veturilon, kiu apartenas al ĉiuj. Nature, ĝi estus kovrita de la impostoj de ĉiuj civitanoj, tiel ke ĉiu, kiu insistus uzi sian privatan veturilon, estus avertita, ke li pagus dufoje por vojaĝi ĉirkaŭ Murcio. Tiukaze ne estus necese

detruu la trafikon sur la Granda Vojo Francisco Salzillo, kie la iamaj kvar vojoj reduktiĝis al unu, plus du por busoj kaj taksioj kaj alia por bicikloj kaj skutiloj. Sed ankoraŭ ne iru, estas ankoraŭ pli:

Oni povus pensi, ke ĉiuj ĝenoj kaŭzitaĵoj de la laboroj por adapti trafikon al la reganta ekologia ideologio utilis al la civitano. Sed tio estas malvera: antaŭe estis promenantejoj sen semaforoj en la urbocentro, sed nun en ĉiuj ili estis instalitaj semaforoj, tiel ke tiu nova sistemo ne nur punas la ŝoforon, sed ankaŭ la piediranton. Nun ni devas pacience atendi, ke nia semaforo verdiĝos por transiri, aŭ rekte transalti ĝin, kion multaj homoj ankoraŭ faras. Ĉu tio antaŭenigas respekton al la leĝo? Mi kredas, ke la rolo de la kompetenta aŭtoritato ne estas monpuni tiujn, kiuj malobeas la regulojn, sed logigi la regulojn. Ekzistas municipoj en Hispanio, kiel ekzemple Vinarozo, kie ekzistas eĉ ne ununura semaforo en la tuta urbo, kun la multaj promenantejoj estas fakte haltosignoj por ĉiuj motorveturoj kiuj cirkulas sur la vojo. Ĉu oni ne povas tion fari en Murcio? Ĉi tie la trafikcirkloj —desegnitaj principe por akceli trafikon— estas bremsitaj kaj distorditaj per semaforoj, kiuj

devigas onin haltigi sian aŭton eĉ se neniu cirkulas sur la trafikcirklo, kaj tiam ankaŭ piedirantoj ne povas transiri ĉar sia semaforo daŭras eterne. Kelkaj havas butonon por ke la piediranto petu sian verdan lumon, sed tio ŝajnas ŝerco, ĉar necesas grandega tempo por ricevi ĝin. Mi ne diras, ke oni forigu la semaforojn —kvankam estus dezirinde— kaj la promenantejoj restu kun fulmanta sukkena lumo, kiel okazas en aliaj landoj, kiel Anglujo, sed almenaŭ oni povus lasi ilin ekbrili sukcene kaj la semaforo malaktivigu, tiel ke ĉiu semaforo iĝu normala zebropasejoj. Tiel, almenaŭ piedirantoj havus liberan trairejon por promeni tra nia urbo, ĉar estas fifame, ke ĉiuj —aŭ preskaŭ ĉiuj— murciaj ŝoforoj haltas ĉe promenantejoj ekde la momento, kiam la piediranto paŝas la unuan linion. Tiu ĉi ŝanĝo ne kostus al la impostpaganto eĉ unu eŭron, sed ĝi eble postulos al urbaj gvidantoj, ke ili sin ĝenu fari ion favore al civitanoj. Konkrete, la semaforo en Placo de Juan XXIII^a en la direkto de Strato Arĥitekto Emilio Pérez Piñero al la Medicina Centro Juan XXIII^a ne havas spacon por la piediranto kies semaforo ruĝiĝis kiam li preterpasas la unuan el la du vojoj, kiuj estas tiel proksime unu la alian. Tiam

alvenas la tramo kaj la aŭtoj, kiuj pasas ĉar ili devas sen konsideri, ke la kompatinda piediranto estas en danĝero. Ĉu iu devas morti por ke ĉi tiu problemo estu riparita? Laŭ mi, ne kostus monon malŝalti tiun semaforon kaj lasi tiun transirejon kiel simplan promenantej, por ke la piediranto ĉiam rajtu transiri tiun probleman transirejon.

En ceteraj kvartaloj estas aliaj kazoj de malfacilaj transirejoj, kiel ekzemple tiu ĉe la enirejo de Espinardo, ĉe la fino de Avenuo Miguel de Cervantes, en kiu se oni premas la butonon ne gravas ĉu oni ne faras, ĉar ĝi verdiĝas por la piediranto tre malfrue kaj dum nur kelkaj sekundoj. Kaj tio ne estas deca.

Mi kutimis pensi, ke ĉi tiuj aferoj okazis ĉar la maldeks-traj politikistoj, kiuj regis nian urbon ĝis antaŭ kelkaj monatoj, ne pensis pri la civitano, sed nur pri sia ideologio. Sed mi vidas, ke nun, kiam la alia flanko regas, la aferoj restas la samaj: la laboroj, kiujn la antaŭaj komencis, estas finitaj, kaj la trafiko en Murcio estas pli malbona ol

iam ajn. Ĉu tial ni pagas al ili ilian salajron?

Nu ne, sinjoroj. Por ĉi tiuj kaj aliaj aferoj mi daŭrigos sen voĉdoni por iu el ili. Ili devas gajni mian voĉon, kaj mi ne donas ĝin apriorie al iu ajn partio, eĉ se ĝi estas tiu, kiu kredas sin esti nova nun. Kaj mi rekomendas, ke vi faru same. Eble vi pensas, ke ĝi ne utilos, sed mi diras al vi, ke nenio pli ĉagrenigas la murcian politikistojn — kaj alilokajn, kompreneble — ol civitano ne voĉdonanta. Ju pli granda estas la sindeteno, des pli granda estas la puno. Ne forgesu ĝin. Se ili volas la voĉdonon, ili gajnu ĝin.

Mi lernis laste, ke tio okazis pro Programo pri Movado, fare de Eŭropa Komunumo. La sola venĝo, kiu restas al civitano estas nevoĉdonado. Ĉar Eŭropa Parlamento ankaŭ ŝajnas malami la civitanojn, kiuj pagas ilian salajron.

Saluton, kaj vi bone cirku-
lu.



Ĉu Pretervivo ekzistas?

Demandi tion hodiaŭ estas kiel scivoli antaŭ la 15^a jarcento ĉu Ameriko ekzistis. Estis tiuj, kiuj diris jes, pli pro nekonfesebla deziro ol pro logika konvinko, ĉar la plimulto estis multe pli konvinkitaj, ke kiam oni atingos la horizonton, la ŝipoj falos en inferon, ĉar la mondo, inkluzive de la maro, estas plata kaj sub ĝi estas nur; infero, kaj supre, la ĉielo. Tial, se oni atingus la finon de la mondo, oni falus en inferon kaj mortus.

